
# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-02 n-ro 343

# Nova versio de roboto-abelo kun novaj kapabloj




Ok homoj mortigitaj en terorista atako en Nov-Jorko

Bombatako mortigis almenaŭ tri homojn en Kabulo

La fora loko kien oni sendas homfaritajn satelitojn por morti

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Bombatako mortigis almenaŭ tri homojn en Kabulo
*Eksplodo en la centro de la afgana ĉefurbo Kabulo p. 03*

Ok homoj mortigitaj en terorista atako en Nov-Jorko
*Kamiono koliziis kun piedirantoj proksime al la Monda Komerca Centro p. 03*

Katalunio: Ĉu la katalunaj gvidantoj estos baldaŭ arestitaj?
*Akuzataj pri «ribelo, instigo al tumultego kaj malversacio» p. 04*

UN urĝas rapidigi paŝojn de efektivigo de la Pariza Interkonsento
*Intensigi la agadon por certigi efektivigon de la Pariza Interkonsento p. 05*

La fora loko kien oni sendas homfaritajn satelitojn por morti
*Kien ili falos? p. 05*

Nova versio de roboto-abelo kun novaj kapabloj
*Plenumi funkciojn de abeloj naturaj p. 06*

Centro por Esploro kaj Praktiko en Kultura Kontinueco
*Revivigo de endanĝerigitaj lingvoj p. 07*

Lerni fremdan lingvon: plej efika cerboekzerco
*Dulingvaj homoj kapablas koncentriĝi kaj prilabori problemojn pli efike ol unulingvuloj p. 08*

Hodiaŭe
*Moa Martinson; Odysseas Elytis; kaj Ugando p. 09*

## Bombatako mortigis almenaŭ tri homojn en Kabulo



Almenaŭ 15 homoj estis mortigitaj aŭ vunditaj lunde [30 okt 2017] posttagmeze en eksplodo en la centro de la afgana ĉefurbo Kabulo.

Lokaj amaskomunikiloj raportis, ke, laŭ la Afgania prisana departemento, la eksplodo okazis en polica distrikto 10 de Kabulo, almenaŭ 3 homoj mortis kaj 12 aliaj estis vunditaj.

Vidintoj konfirmis al la novaĵ-agentejo *Xinhua* [新华社 xīnhuáshè], ke la eksplodo okazis je la 16a horo kaj 3 minutoj laŭ la loka tempo. Laŭ tuja esploro, suicida atakanto eksplodigis bombaŭton, tamen oni ankoraŭ ne sciis konkretan celon de la atako. La ekstremisma grupo Islama Ŝtato deklaris sian respondecon pri la atako.

En la polica distrikto 10 de Kabulo troviĝas pluraj internaciaj institucioj, fremdlandaj ambasadorejoj kaj organoj de la afgani registaro. La 31an de majo en tiu ĉi distrikto okazis bombatako, mortigante almenaŭ 90 homojn.

Yu
Ĉina Radio Internacia

## Ok homoj mortigitaj en terorista atako en Nov-Jorko




Nov-jorka urbestro diris marde [31 okt 2017], ke ok homoj estis mortigitaj kaj pli ol dek aliaj vunditaj, post kiam kamiono koliziis kun piedirantoj proksime al la Monda Komerca Centro en Nov-Jorko.

Urbestro Bill DE BLASIO diris en gazetara konferenco, ke laŭ la informaj aŭtoritatoj, la okazaĵo estis aparte malkuraĝa terorisma ago direktita al senkulpaj civiluloj.

Parolante en gazetara konferenco kun la urbestro, polica komisaro de Nov-Jorko James O 'NEIL diris, ke la suspektato estas 29-jara viro, kiu ne estas el Nov-Jorko. Li diris, ke aŭtoritatoj ne tuj publikigos lian identecon [laŭ postaj raportoj, estas uzbeko Sajafullo SAIPOV].

O 'NEIL diris, ke je la 3a horo kaj 5 minutoj posttagmeze, viro stiranta luprenitan kamionon iris sur la biciklovojon de la Okcident-Flanka Ŝoseo en la strato *Houston*. Li aldonis, ke la viro komencis veturi suden, trafante kelkajn piedirantojn kaj biciklantojn laŭ la itinero.

En la strato *Chambers*, la kamiono koliziis kun lerneja buso, vundante du plenkreskulojn kaj du infanojn, laŭ la polico.

Post la kolizio, la ŝoforo iris el la veturilo, tenante du kopiitajn [?] pafilojn. Li estis mortpafita [fakte nur vundita] de polico vestita en uniformo kaj estis sendita al hospitalo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Katalunio: Ĉu la katalunaj gvidantoj estos baldaŭ arestitaj?

Krom Carles PUIGDEMONT, la tuta eksigita kataluna ekzekutivo riskas persekutojn.

La hispana ĝenerala prokuroro postulas de la sendependistaj gvidantoj, ke ili kiel eble plej rapide prezentiĝu antaŭ enketjuĝisto. Ili estas akuzataj pri «ribelo, instigo al tumultego kaj malversacio».

Male, mandatoj pri arestadoj estos plenumitaj.

En Barcelono kaj Katalunio, la alvoko pri civila malobeemo ŝajne havis malmulte da sukceso.



Katalunio estas sub protektado de Hispanio de post vendredo [27 okt 2017], pro la apliko de artikolo 155 de la Konstitucio, neniam uzita ĝis nun.

La 200 000 funkciuloj plimulte laboris kiel kutime ĉi-lundon [30 okt 2017].

Ricard PONS estas unu el ili: «Mi ne estas juristo, sed laŭ mi la akuzo pri ribelo implicas perforton, sed neniu violento okazis. Mi do opinias, ke tio estas troiga», li diris.

Maria Teresa RUBIO, kataluna pensiulino, kredas male, ke la aŭtoritatoj «prave lanĉis tiujn persekutojn». Laŭ ŝi, la kataluna registaro «ne respektis la leĝon kaj ĉiuj, kiuj ne respektas la leĝon devas ricevi punon»

Ribelo estas punebla ĝis 30 jaroj da malliberejo.

Ĉi-semajnfine, PUIGDEMONT petis de siaj defendantoj, ke ili «demokrate» kontraŭstaru la protekton de la regiono.

Lia partio *PdeCat* anoncis, ke ĝi partoprenos je la regionaj balotoj, kunvokitaj de Madrido venontan 21an de decembro argumentante, ke gravas por la sendependistoj, ke «la kataluna socio povu esprimiĝi».

Neniam Milito Inter Ni

# UN urĝas rapidigi paŝojn de efektivigo de la Pariza Interkonsento

La Programo de la Unuiĝintaj Nacioj pri Medio marde [31 okt 2017] publikigis raporton kiu diras, ke la emisiredukto promesita de diversaj landoj povas sumiĝi je nur triono de la celata nombro por 2030, kaj ĉiuj partioj, inkluzive de privataj sektoroj kaj lokaj registaroj devas intensigi la agadon por certigi efektivigon de la Pariza Interkonsento.




La Pariza Interkonsento esperas limigi tutmondan varmiĝon ĝis malpli ol du celsiaj gradoj, kun diskutata pli ambicia celo de 1,5 celsiaj gradoj. Atingi ĉi tiujn celojn reduktos la eblecon de severaj klimataj efikoj, kiuj povas damaĝi homan sanon, vivtenadon kaj ekonomion en la tuta mondo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# La fora loko kien oni sendas homfaritajn satelitojn por morti

Fine de vivodaŭro de la homfaritaj satelitoj kaj kosmoŝipoj orbitaciantaj ĉirkaŭ la Tero, la plimulto el ili povos reveni, sed kien ili falos?





Tiuj malpli grandaj satelitoj ĝenerale forbruliĝas enirante la atmosferon, sed kelkaj pecoj de tiuj pli grandaj postvivas la froton kaj ili kolizias kun la grundo. Por eviti, ke ili falos sur densloĝata regiono, kutime oni kondukas ilin al areoj ĉe la nomata "oceana poluso de nealirebleco".

Tiu punkto en la oceano estas la loko plej fora disde ajna teritorio – ĝi situas en suda Pacifiko je ĉirkaŭ 2 700 kilometroj sude de la insularo Pitkarna, ie ĉe "la nenies lando", inter Aŭstralio, Nov-Zelando kaj Sud-Ameriko.

En tiu regiono ĉirkaŭ 1 500 km2 de la oceano pli kaj pli iĝas kvazaŭ tombejo pri satelitoj konstruitaj de la homaro. Je la lasta nombrado tie enhavis 260 tiaj aĵoj, la plimulto el Ruslando.

Kuranta plano estas, ke en la venonta jardeko la Internacia Kosmostacio estos malaktivigita kaj kondukita al la "oceana poluso de nealirebleco". Kun pezo da 450 tunoj ĝia reveno al la Tero certe konsistos spektinda okazintaĵo.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog



## Nova versio de roboto-abelo kun novaj kapabloj

Foje Interalie jam rakontis pri malgrandaj robotoj-abeloj, kiuj kapablas plenumi funkciojn de abeloj naturaj. Jen sekvis nova paŝo.

La unua prototipo de roboto-abelo estis prezentita en la jaro 2013. La disponaĵo kapablis svingi per flugiloj 120 fojojn unu- sekunde, salti kaj ekflugi. Perfektigante la modelon inĝenieroj kapabligis ĝin halti sur muroj, subakviĝi kaj naĝi. Ĉiu el la taskoj postulis novecan solvon: konkrete, tro malpeza roboto ne povis subakviĝi - ĝenis la surfaca tensio de akvo. Sukceso venis, kiam roboto plirapidiĝis antaŭ ol subakviĝi.

Tamen la roboteto ne povis elakviĝi kaj daŭrigi la flugadon. Ĉi-problemo estis solvita en la nuna 2017-a jaro. Por superi la saman surfacan tension, kiu ĝenas elakviĝi, ellaboristoj alfiksis al la suba parto de la roboto specialan ujon.

Atinginte la surfacon la roboto-abelo kolektas akvon en la ujo kaj tuj per elektro disfaligas akvon je hidrogeno kaj oksigeno. Rezulte la roboto gajnas aldonan floseblecon kaj ĝiaj flugiloj povas aperi super la akva surfaco. Poste la aparato ekflamigas la gasan miksaĵon per elektro. Ĝi eksplodetas kaj pro tio la roboto ekflugas.

La inventaĵo havas grandan praktikan signifon. Ĉi-roboto povas esti uzata en savado dum serĉado de suferintoj, ĉar la aparato kapablas libere moviĝi en ajna medio. Eblas ankaŭ sendi ĝin por kolektado de sciencaj datenoj en malfacile atingeblaj lokoj.

Kirill NOVIĈENKO
Interalie




# Centro por Esploro kaj Praktiko en Kultura Kontinueco

En la Varsovia Unversitato kreiĝis internacia esplorcentro, kiu okupiĝas pri revivigo de endanĝerigitaj lingvoj. Centro por Esploro kaj Praktiko de Kultura Kontinueco kunlaboras kun universitatoj en Londono, *Leinden*, *Groningen* kaj MaxPlanck-Instituto en Jeno. Ĝi kreiĝis en la fakultato „*Artes Liberales*", kie de jaroj la kolektivo de doktorino Justuna Olko gvidas interbranĉajn projektojn pri kultura perado inter Eŭropo kaj Ameriko kaj reviviĝado de lingvoj minacitaj de formorto. La esplorojn partoprenas ne nur sciencistoj el diversaj centroj en la tuta mondo, sed ankaŭ indiĝenaj uzanoj de la endanĝerigitaj lingvoj.

En Pollando temas pri reprezentantoj de la vilamovica lingvo, lingvo de karpatiaj montaranoj (ŭemka) kaj la kaŝuba. La centro kunlaboras eksterlande kun loĝantoj de Man-insulo, *Guernsey*, Eŭskio, kun sameoj en Finnlando kaj Norvegio kaj kun parolantoj de la azteka lingvo en Meksiko. La sciencaj projektoj fruktas per praktikaj strategioj kaj materialoj ligitaj kun lingorevivigo. Krom lernolibroj, vortaroj, popularsciencaj libroj kaj aliaj helpmaterialoj sciencistoj gvidas rendevuojn kaj laborrenkontojn dum someraj kaj regionaj lernejoj. Ili substenas lokajn iniciatojn servantajn al konservo de la kultura kaj lingva aparteco de loĝantoj de koncernaj regionoj.

Ne laste ili kunorganizas artajn kaj scienc-popularigajn eventojn. Jam en novembro la nova centro organizos eŭropan konferencon dediĉitan al la azteka lingvo en Meksiko kaj laborrenkontojn kaj internacian konferencon „Engaĝita humanismo", kiu estos ligita kun revivigado de lingvoj minacitaj.

Pola Retradio

# Lerni fremdan lingvon: plej efika cerboekzerco

Du usonaj universitatoj lastatempe profunde esploras la influon de lingvolernado je la sano de la cerbo. Ni jam tuŝis tiun temon ĉi tie, en la Esperanta RetRadio. Nun ili konkludis, ke tio estas por la cerbo la plej efika ekzercado, kiu nepre povas certagrade protekti ĝin kontraŭ tro frua maljuniĝo kaj demenco. Dulingvaj homoj kapablas koncentriĝi kaj prilabori problemojn pli efike ol unulingvuloj.




Nia cerbo funkcias kiel trafik-signalilo, kiam ni uzas fremdan lingvon. Se ni bezonas vorton por esprimi ideon, ĝi baras neĝustajn vortojn per ruĝa lumo kaj prezentas verdan lumon, kiam ni trovas ĝustan vorton. Pluraj regionoj en la cerbo devas aktivi, por ke tio okazu. Oni detale studas tion per magnet-resonancaj ekzamenoj. Komparante la funkciadon de cerboj de unulingvuloj kun tiuj de dulingvuloj, oni klare konstatas diferencon de oksigenofluado en iuj cerboregionoj. Tio signifas pli “fleksеblajn” cerbojn, kiuj kapablas pli efike prilabori komplikajn situaciojn kaj solvi ilin pli lerte. Kaj ĝi verŝajne ne dependas de tio, kiu estas la koncerna dua lingvo.

Kiu estas la plej favora aĝo por eklerni duan lingvon? Esploroj konfirmis tion, kion la praktiko jam de longa tempo montris: ju pli frue, des pli bone. Dum la unuaj vivojaroj, cerboj estas multe pli akceptemaj al dua lingvo. Infanoj relative facile alprenas ĝin, kompare kun plenaĝuloj.

En pasinta tempo, gepatroj ofte esprimis sian timon troŝarĝi la menson de siaj etuloj per troa strebado, ekzemple por fremda lingvo. Tia timo montriĝis senfundamenta. Se oni uzas taŭgan metodon, tiam infanoj rapide lernas lingvon sen ia risko. Se oni prokrastas ĝin ĝis plena aĝo, tiam la lernado fariĝas pli akademieca, peniga kaj malrapida.

Oni tamen emfazu: en ĉiu aĝo estas konsilinde ekzerci la cerbon per lernado de fremda lingvo. Kiel ni bone scias, Esperanto estas tre taŭga alternativo.

Nuntempe, oni rapide progresas en la kampo de perkomputila, aŭtomata tradukado. Fakuloj iom facilanime prognozas, ke lernado de dua lingvo ne plu estos necesa, en la estonteco. Tre dubinda prognozo. Ĉu aŭtomata tradukado, kiu dependos ĉiam de maŝinoj, vere povos anstataŭi senperan komunikadon?

Fakto estas, ke homaj cerboj pli bone funkcius, se ĉiuj parolus Esperanton...

Paŭlo Sergio VIANA
Esperanta Retradio



## Moa Martinson


**Moa Martinson (origine: Helga Maria Swartz; naskiĝis la 2-an de novembro 1890 en *Vårdnäs*, mortis la 5-an de aŭgusto 1964 apud Stokholmo) estis sveda verkistino.**

**En Esperanto aperis: *Vespera ruĝo anoncas ventegon.***

**Vikipedio**

---

## Odysseas Elytis



**Odysseas Elytis - Οδυσσέας Ελύτης, vere: O. Alepoudelis (naskiĝinta la 2-an de novembro 1911 en Iraklio, mortinta la 18-an de marto 1996 en Ateno), estis novgreka poeto. Li estis la laŭreato de Nobel-premio pri literaturo en 1979.**

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

***Damaliscus lunatus topi*,**

**en Ugando.**

**Vikipedio**